# ADORU 228.5 (4-voĉa)






Jen brilas stelo el malhel',
el monda malesper'.
Anĝeloj kantas de l' ĉiel'
pri paco sur la ter'.
Naskiĝis en la stalo
la Krist-infan' por ni.
Kaj tra la sfera halo
aŭdeblas: Glor' al Di'.

Sen iom ajn de l' Dia glor'
Vi kuŝas en kaban'.
Maldormas ame Via kor'
por mi, ho Krist-infan'.
Vi iĝis povra sklavo
por pliriĉigi min.
Jesuo, mia ravo,
mi kore dankas Vin.

JEN DORMAS ĈIU ENLOĜANT' • HAM 65 • M (Forest Green): Anglio 16a jc. • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 1995